Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

21-a Jarkolekto * Julio 2004 * N-ro 74

ISSN 1576-0618



Alcalá la Real en Jaeno.
la fortikaĵo atente observas
la vilaĝon kiu naskiĝis ĉirkaŭ ĝi

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Armengual de la Mota 33, 4-D, 29007 MÁLAGA.
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress. Córdoba

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 MÁLAGA, esperanto@ciudadfutura.com)
José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ (esperanto14@supercable.es)
COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ, Angel ARQUILLOS, José Antonio VALVERDE MARTÍN, D-ro Wolfgang GUNTHER

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio. 3
Vikingoj en Al-Andaluso 8
Esperanto, ĝia ekologia identeco 10
Interlingvistiko: *Toki Pona* 13
Protokolo de la Ĝenerala Asembleo de AEU 18
Provizora Programo de la 10a Andaluza Kongreso Eo 20
Esperanto en Jaeno 21
Andaluza Literaturo 23
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio 25
Flamenko 27
Poezia Angulo 28
Turismi en *Alcala la Real* 29
Fakaj Asocioj 31
Fina Paĝo 34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

ESPERANTO EN ANDALUZIO

ONUBO

* La pasintan 10an de julio kunvenis en Onubo la fondiĝa asembleo de la nova asocio "Onuba Esperanto-Asocio". Jen la unua fojo en la historio de la esperanto-movado en Andaluzio en kiu ekzistas asocio en ĉi tiu andaluza provinco. Komence, nur apartenas al ĝi geesperantistoj de la urbo Onubo sed tutcerte baldaŭ ili kontaktos kun esperanto-parolantoj loĝantaj en la provinco.

* La pasintan 24an de junio la radia elsendejo *Radio Nacional de España Radio-5* , en sia provinca programo, dissendis intervjuon al la onuba esperantisto Viktoro Macías. Oni parolis pri la naskiĝo de la nova esperanto-asocio kaj pri ĝeneralaj aferoj rilataj al la internacia lingvo.

* La membroj de la ĵus naskita Onuba Esperanto-Asocio laboras en unu el la plej gravaj celoj de ĉi tiu grupo, tio estas kontakti kun esperantistoj de Algarvo (la suda regiono de Portugalio), por krei ligecon kun esperantistaj grupoj ne-hispanparolantaj. Li kontaktis kun la Portugala Esperanto-Asocio, laŭ ĉi tiu asocio ekzistas, almenaŭ, sep esperantistoj en Algarvo. Oni pluinformos pri ĉi tiu afero.

* Onuba Esperanto-Asocio disponas pri propra interreta-paĝo, se Vi deziras vidi ĝin, kliku en Via komputilo http://groups.msn.com/EsperantoenOnubo.


SEVILO

* La pasintan 15an de majo okzis la unua Ĝenerala Asembleo de la refondita Sevilja Esperanto-Asocio. Oni profitis tiun okazon por rekontakti kun personoj kiuj jam estis aktivaj en la loka Esperanto-movado antaŭ kelkaj jaroj. Al la nova estraro apartenas la jenaj gesamideanoj:

Prezidanto: José Pavón Arreciado.
Vic-prezidantino: Mª Dolores García Perea.
Sekretario: José Roldán León.
Kasisto: Antono Rodríguez Gasch.
Voĉdonantoj: Manuel Ortega Castillo (Informadikaj Aferoj)
Eduardo González Ordóñez (Dokumentaraj Aferoj)
Miguel A. Romero Junquera (Propagandaj Aferoj)
Ramón Castejón Mellado.

Unuacele la nova estraro deziras trovi taŭgan lokon por organizi la semajnajn renkontiĝojn de la asocio kaj akiri komputilon. Rilate la disvastigon de la internacia lingvo, Sevilja Esperanto-Asocio celas kontakti kun malsimilaj grupoj por organizi bazajn kursojn de esperanto kaj eĉ kun la propra Universitato por ebligi la ekziston de kurso de esperanto. Por tiuj sevilaj esperantistoj kiuj ankoraŭ ne kontaktis kun la asocio sciu, ke la elektronik-adresaj kontaktoj estas: noelnadlor@hotmail.com kaj manuelortega87@hotmail.com. Aŭ en la telefonoj 954 12 15 24 aŭ 661 40 41 20.

* Kiel daŭrigo de la ĵus legita informo, ni tutplezure sciigas, ke Sevilja Esperanto-Asocio jam trovis lokon por renkontiĝi, kiu samtempe estos ĝia oficiala sidejo. Temas pri la Municipa Kultur-centro "Casa de las Sirenas", ĉe la Alameda de Hércules. La renkontiĝoj de la grupo okazas ĉiu-ĵaŭde je la 19,30 horoj. Kompreneble, la sabataj renkontiĝoj je la 10,30 ĉe la Placo Encarnación ankoraŭ daŭriĝas.



MALAGO

* Dum la jaro 2004, la programo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo "Esperanto en Bibliotekoj" havigis al diversaj publikaj bibliotekoj de la malaga provinco la libro-metodon verkita de Miguel Gutiérrez Adúriz *Esperanto, curso del idioma internacional.* Detale, jen la listo de la malagaj publikaj bibliotekoj kiuj ricevis la libron:

Alhaurín el Grande	Alora	Antequera	Archidona
Casares	Coín	Competa	Estepona
Fuengirola	Málaga	Marbella	Nerja
Ronda	Torrox	Vélez-Mága	

JAENO

* Jaena Esperanto-Asocio partoprenis per kurseto de esperanto en la festivalo Etnosur. La festivalo Etnosur estas etna festivalo kiu okazas ĉiujare en la jaena vilaĝo Alcalá la Real, tre proksima al la provincoj de Granado kaj Kordovo. En ĝi partoprenas dekmiloj da homoj kiuj venas en la vilaĝon allogitaj de la vastega kultura festivala programo. Unu el la aranĝoj en tiu kultura programo ĉijare estis kurseto de la internacia lingvo, organizita de Jaena Esperanto-Asocio.

La kurson gvidis nia samideano Ramon Rius (de Barcelono, membro de Kataluna Esperanto-Asocio) kaj en tiu gvidado kunlaboris aliaj samideanoj kiel Victor Macías (de Onubo), Ángel Arquillos (de Malago) aŭ Jordi Lietor (de Jaeno).



Kurso de esperanto organizita de Jaena Esperanto-Asocio, kadre de la kultura festivalo Etnosur.

→

La unuan tagon ni trovis kelkajn malfacilaĵojn: ni malkovris, ke ni ne povos starigi la planitan budon pro miskompreno de la organizantoj kiam ni prezentis la projekton, okazis problemeto rilate al la dormejoj, ktp. Sed finfine ĉio solviĝis.

La duan tagon ĉio funkciis pli bone. Ni decidis starigi la budon en la ejo mem kie okazis la kurso, tio ebligis la vendadon de kelka materialo kaj la montron de esperantaj kulturaĵoj (libroj, KD-oj, revuoj, ktp.) Kun la sperto de la unua tago, la gvidanto disvolvis la kurson laŭ pli distra maniero kaj multaj el la ĉeestantoj montriĝis vere interesitaj pri la lingvo. Post la kurso okazis eta debato pri esperanto kaj pri ĝiaj avantaĝoj. La nombro de ĉeestantoj sabate estis sufiĉe granda (ĉirkaŭ 40 aŭ 50 homoj). Esta substrekinde, ke sabate partoprenis kelkaj homoj kiuj havis filologiajn konojn, kaj la nivelo de la demandoj kaj respondoj inter ili kaj la gvidanto (Ramon estas filologo) ŝajnis dum kelkaj momentoj universitata.

La tria tago estis dediĉata preskaŭ tute al la debato pri la lingvo. Post kelkaj minutoj pri gramatiko, ktp. ni starigis debaton pri esperanto en amika kaj ŝerca etoso kun la ĉeestantoj en kiu partoprenis preskaŭ ĉiuj. Kelkaj loĝantoj de Alcalá donis siajn retpoŝtajn adresojn kaj aĉetis librojn, ĉar ili volas lerni la lingvon. Aliaj homoj de aliaj provincoj ankaŭ montris sian intencon lerni la lingvon (homoj de Granado, ekzemple).



Grupo de esperantistoj kaj simpatiantoj organizis la kurson de esperanto kadre de Etnosur.

La rezulto, malgraŭ la malfacilaĵoj kaj eble, nia erara maniero okazigi la kurson dum la unua tago, estas, laŭ mia opinio, sufiĉe pozitiva.

Sed je tio ne limiĝis nia partopreno en Etnosur, ĉar ĵurnalisto de Canal Sur telefonis min por partopreni rekte en tutandaluza programo. Ángel Arquillos kaj mi partoprenis dum malmultaj minutoj en la radio kaj parolis en kaj pri esperanto. La ĵurnalisto promesis telefoni nin por pretigi radiaĵon pri esperanto.

PABLO FOCHE
de Jaena Esperanto-Asocio


10 a
Andaluza Kongreso de Esperanto
Congreso Andaluz de Esperanto
Sevilla, 31an okt. / 1an nov. 2004

Vikingoj en Al-Andaluso

j.m.r.h.

Andaluzio estas lando kiu, tra sia historio, vidis la invadon de multaj popoloj: romianoj, araboj, visigotoj, vandaloj, britoj ktp. La Historio longe kaj detale rankontas al ni ĉi tiujn okazintaĵojn. Sed ne estas tiel konataj la invadoj de Andalujzio plenumitaj de la vikingoj, tiuj normanaj piratoj kiuj navigis tra Eŭropo inter la 8-a kaj la 10-a jarcento.

La plej fama invado okazis en la jaro 844 p.K. La araboj nomis la vikingojn *al-Urdumanijyyun* (la normanoj) aŭ pli simple la *Mayus* (la fajr-adorantoj). La 20-an de aŭgusto de la jaro 844 (aŭ la unuan de la monato Du-l-hiyya de la jaro 119 post la heĝiro por la islamoj) 54 grandaj ŝipoj kaj alia granda nombro da malgrandaj boatoj atakis Lisbonon. La luktado daŭris tri tagojn kaj fine la trupoj la lisbona guverniestro Wahb Allah Ibn Hazm rifuzis ilin. Tamen la granda ŝiparo navigis suden kaj post kelkajn semajnojn venis en Kadizon, urbon kiun ili atakis kaj konkeris. La 29-an de septembro 844-a vikingaj ŝipoj supreniris tra la navigebla rivero Gvadalkiviro, ili atingis la insulon hodiaŭ konata kiel "Malgranda Insulo", tiam tiu zono nomiĝis *Qabtil*. Kvar ŝipoj marŝis ĝis la urbo Coria del Río, la vikingoj elŝipiĝis kaj masakris la enloĝantojn.



Aŭtentika vikinga ŝiparo supreniris la riveron Gvadalkiviron en la jaro 844-a

Post tri tagoj ili atakis la urbon Sevilon. La guverniestro de la urbo fuĝis en Karmonon kaj tiel Sevilo restis senhelpa. La vikingoj detruis la ŝipojn kiuj restis en la sevila haveno, ili okupis la urbon kaj dum sep tagoj ili rabadis komplete la urbon. La vikingoj sklavigis ĉiujn enloĝantojn de la urbo, eĉ tiujn maljunajn aŭ vunditajn. Ili kondukis la malliberigitojn en la Malgrandan Insulon kaj poste ili revenis en Sevilon. Tie, troviĝis nur malgranda grupo de maljunuloj renkontiĝitaj ĉe moskeo. La vikingoj mortigis ĉiujn kaj ekde tiam tiu moskeo estis konata kiel la moskeo de la martiroj (*Masyid al-Suhada).*

Ĉar oni eblas navigi tra la rivero Gvadalkiviro nur ĝis la urbo Sevilo, la vikingoj decidis supreniri tra la rivero kun la helpo de ĉevaloj trovitaj en la zono. La kordova kalifo Abd al-Rahmn la dua konis la terurajn novaĵojn kaj tial li mobilizis sian armeon kaj sendis la kvalerion kontraŭ la vikingojn. Estris la kordova armeo la eŭnuko Nasr, unu el la plej fidindaj konsilantoj de la kordova kalifo. La lukto inter la araboj kaj la vikingoj okazis en la zono kie hodiaŭ stariĝas la milita flughaveno Tablada (urbo Sevilo), tio okazis la unuan de novembro 844-a. La al-andalusoj venkis. Oni diras, ke mortis preskaŭ mil vikingoj kaj aliaj 400 estis malliberigataj. La araboj mortigis tiujn 400 venkitajn malamikojn antaŭ la ceteraj vikingoj kiuj fuĝis suden. La araboj detruis ankaŭ 30 vikingajn ŝipojn kaj la kapojn de multaj mortintoj oni pendumis en la sevilaj palm-arboj.

Multaj vikingoj sukcesis fuĝi sur siaj ŝipoj, kelkaj el ili atakus poste la urbon Niebla, la regionon Algarvon kaj eĉ la nordo de Afriko. Sed aliaj fuĝis en la kamparojn de Karmono kaj Moron´. La al-andalusa ĝenerala Muhammad Ibn Rustum persvadis ilin pri la konveno kapitulaci. Oni garantiis iliajn vivojn. Ĉiuj ili islamiĝis kaj restis en tiu samaj zonoj (Karmono kaj Moron´) kie ili bredis kaj produktis laktaĵojn. Kurioze oni diras, ke la origino de la fromaĝoj produktitaj ankoraŭ nuntempe en tiu sevila zono baziĝas sur la instruoj de tiuj vikingoj, popolo ankaŭ fama pro la kvalito de siaj fromaĝoj.

Ĉu vi ŝatas la historion de Andaluzio?
Sendu al nia viajn konitaĵojn pri ĉi tiuj temoj.

ESPERANTO
ĝiaj ekologia identenco
kaj surloka aplikado kiel komuna lingvo
de interkulturaj grupoj

D-ro med. W. Gunther

Esperanto estas ĉeflingvo de homrajte bazita prikomuniada instruiteco, la Angla la ĉefidiomo de kapitaldependa konsumismo. Jen la provoko...

Laŭ (iom ampleksigita) PIV la Angla ĉefe aktivas en sistemo, kiu trudas al pesonoj de riĉaj landoj sub ĝia influo difinitan detruon rapidan kaj konstantan de substancoj pro ties prenado (aŭ neglektado) por personaj celoj. La motivo de ĉi sistemo ests la mono. Kapitalo kaj konsumismo parolas la Anglan. Nur teorie oni povas ekstrakti la puran lingvon "Angla" el la konsumismo.

Esperanto estas (denove per nocioj de PIV) kvalito aŭ stato de kompetenta neŭtrala planlingvo, aplikenda surbaze de siaj imanentaĵoj "paco", "homaj rajtoj" kaj "daŭropovo" (ekologio). Demokratio kaj ekologio parolas Esperanton. En ekologia demokratio la vivo gravas kaj pro tio ankaŭ la homo supervivos. Ĉisence Esperanto estas supervivigilo.

Transe de la diversaj rilatoj kaj postuloj aktualaj de la unuopaj ekologiismaj partioj en Eŭropo restas 2 solvoj de la lingvoproblemo en la Eŭropa Unio (kaj la cetera mondo):

1-e. La optimuma solvo (aŭ farebla utopio): Enkonduko kaj aplikado de universala "demokratia dulingveco" kun Esperanto kiel komuna komunikilo laŭ la konata moto "Ĉiu scipovu minimume 2 lingvojn, sian gepatran kaj Esperanton!" La optimumo konsistas en la ĉiea garantio de universala minimumo de neŭtrala komunikada kompetenco vidalvide la ĉefe ekonomie perataj hegemoniaj (per)fortoj de la Angla (kaj de aliaj t.n. "mondlingvoj").

2-e. La minimuma solvo (aŭ farenda utopio): Enkonduko kaj apliado de universala "demokratia dulingveco" en la EU kiel aldona, komplementa, neŭtrala laborlingvo por tiuj, kiuj volas tion. Ĉi tiuj certe estas ne nur

kun-Eŭropanoj el kulturoj de ne-laborlingvoj, sed ankaŭ kuncivitanoj el landoj de etnaj labor-lingvoj –homoj, kiuj pro respekto al la idealoj de demokratio, egaleco kaj justeco "libervole" kaj memkompreneble akceptas Esperanton -. Aktuale kaj vidalvide la 2 ĉirilataj malraciaĵoj konstateblas: la neglekto rilate Esperanton flanke de la politikaj elitoj en la EU similas al la neglektemo de la Esperanto-movado pri sia ekologia kriterio.

De neŭtrale ekologia vidpunkto la demokratia dulingveco estas el si mem preventiva kaj pro tio alkalkuleblas al la mem-organizado kaj –konservado de la biosfero. La imanente ekologia Esperanto estas do tieldire decida parto komunikada de la humanekologio. Jen 2 aspektoj en tio:

1-e. La kvalita. Esperanto imanente reduktas la interkulturan riskonivelon. Kiel neŭtrala lingvo ĝi dekomence kunigas kaj aŭtomate kreas komunikadan egalecon kaj pli da justeco.

2-e. La kvanta. Esperanto imanente reduktas la nivelon de resursomalŝparado. Kiel unu lingvo por ĉiuj ĝi ekstreme malaltigas la nombron de la tradukdirektoj, ŝparante materialajn kaj personarajn elspezojn.

La sciencaj esploroj pruvis, ke la prioritata ĝislernado de Esperanto konsiderinde (ĝis sepono) malaltigas la investon de tempo lernado de aliaj fremdlingvoj. Ne nur ĉi fakto, sed la trea ideo de ĉiea lernebla kompetenta neŭtrala planlingvo forte subtenas la surlokan utiligadon de Esperanto. La ebleco kontakti el la propra loko la tutan mondon kun certeco esti komprenata de aliaj kaj kompreni aliajn estas modela plenumo de la ekologia principo "Pensi terglobe, agi surloke". La neceso en etnaj lingvoj pri "lingvokleriga turismado" en la mondo praktike forfalas ĉe Esperanto.

Ĉi aspekto ĝis nn ne estas sufiĉe prilaborata en la Esperanto-movado. Sed la ekologiaj Esperantistoj nepre interesiĝu pri ĝi!

Koncepto pri loka agado estas "la interkultura grupo kun Esperanto kiel komuna lingvo" (kurtvorte eble "INTEGROesperantista". Nuntempe en la pligrandiĝanta EU multe da diversnaciaj homoj kvazaŭ "nature" distribuiĝadas en ĝi. Unuopaj esperantistoj aŭ jam ekzistantaj Esperanto-grupoj povus organizi lingvokursojn pri Esperanto kun la deklarita celo surloke kunvenigi interesatojn el diversaj nacioj (kune kun samlandanoj), kiuj vivas en la respektiva regiono, en interkultura grupo

kun Esperanto kiel la komuna lingvo-grupo, kiu teorie kaj praktike temigas vivon surbaze de paco, homaj rajtoj kaj daŭropoveco. La ekologiaj partioj (kaj, kompreneble, ankaŭ aliaj partioj, kiuj ne timas Esperanton!) povus partopreni en ĉi aktivecoj per diskonigo de sia infrastrukturo (ejoj, informado, ktp.) Ĉi koncepto ne bezonas multe da monaj aŭ alimaterialaj resursoj, sed des pli multe da entuziasmo kaj daŭrigemo.

Ĉiukaze la "homamasa bazo" por konvinki politikitojn kaj instancojn publikajn kaj surloke kaj internacie pligrandiĝus. En la koncepto de interkulturaj grupoj esperantlingvaj kombiniĝas la specifaj trajtoj de Esperanto kiel kompetenta neŭtrala interkomunikilo kaj la konkretiĝo de interkultura interkompeniĝado. Ĝi povas esti aktiva modelo eknomas "interbatalo de la kulturoj". Krom tio kaj efektive ne ekzistas multaj lokoj en Eŭropo, en kiu ĉi koncepto ne povus esti provita.

Resumo

Esperanto estas imanente ekologia. Pro kialoj de demokratio postulendas ĝia utiligado kiel komplementa neŭtrala laborlingvo en la EU. Estas prezentita la terglobe surloke aplikebla koncepto de "interkultura grupo kun Esperanto kiel komuna lingvo" (INTEGROesperantista). Ĝi konsistas en formado de interkultura grupo el homoj de diversaj nacioj en unu regiono, komencanta per Esperanto-kurso, komune organizataj de esperantistoj kaj la verdaj (aŭ aliaj interesataj) partioj.

Programo "Helpo al UEA-delegitoj"

Memoru, ke se al Vi interesas esti delegito de la Universala Esperanto-Asocio en Via urbo, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas preta pagi parton de la membro-kotizo en tiu internacia organizo. Nur estas necese esti membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj esti preta agadi kiel delegito de Universala Esperanto-Asocio en Via urbo.

Nia celo estas atingi, ke ĉiuj provincoj de Andaluzio disponu pri, almenaŭ, unu UEA-delegiton. Se al Vi interesas ĉi tiun proponon kontaktu kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

INTERLINGVISTIKO

Toki Pona.-

Ekzitas projektoj de internaciaj lingvoj kiuj, krom komunikiloj, estas veraj artaĵoj kaj kurioze preskaŭ ĉiuj ili estas elkreaĵoj de esperantistoj. Unu el tiuj lingvoj estas TOKI PONA aŭ "*la bona lingvo*". Toki Pona estas pripensita, kreita kaj disvolvita inter la jaroj 2001 kaj 2004, kaj verŝajne ĝi ankoraŭ ne estas finita laboro, de juna kanada esperantistino Sonja Elen Kisa.

Kiel asertas ĝia kreinto Toki Pona estas minimuma lingvo, kiu turnas la atenton al la simplaj aferoj en la vivo. Tio signifas, ke ĝi kreiĝis por esprimi la plej multon uzante la plej malmulton, ja vera artaĵo. La tuta lingvo havas nur dektri bazajn sonojn kaj entute nur 118 vortojn! La gramatiko, kvankam diferenca de Esperanto, estas tre regula kaj facile lernebla.

Kun tiuj nur 118 vortoj, en Toki Pona oni nur uzas la vortojn kiuj reprezentas la plej simplajn kaj universalajn elementojn de la homa vivo: homo, manĝi, akvo, bona, malbona, amo, tero, suno, doni, paroli, dormi, ktp. Por konstrui pli profundan aŭ komplikan signifon, oni facile kunmetas tiujn bazajn vortojn. La nomo Toki Pona signias tion, la bona lingvo.

GRAMATIKO

Alfabeto.

a-e-i-j-k-l-m-n-o-p-s-t-u-w

La sono de ĉiuj literoj estas egalaj al tiuj de esperanto, escepte la w kiu similas al ŭ.
Oni uzas nur la minusklajn literojn, eĉ komence de frazo, tiuj majusklaj nur indikas la geografiajnkaj personajn nomojn.
Oni akcetas la unuan silabon de ĉiu vorto.

Artikolo.

Tute ne ekzistas.

Personaj Pronomoj.

mi = *mi*
vi = *sina*
li-ŝi-ĝi-ili = *ona*
ni = *mi mute*
vi = *sina mute*
ili = *ona mute*

La unua kaj dua personaj pronomoj "*mi* , *sina* " akompanas rekte la verbon,
ekz. *mi moku* (mi manĝas)
sina moku (vi manĝas)

Se ni uzas la trian personon "*ona*" oni devas uzi inter ĉi tiu pronomo kaj la verbo la partikulon *li.*
ekz. *ona li moku* (li manĝas).

Verboj.

En la lingvo Toki Pona ne ekzistas la diferencon inter la gramatikajn kategoriojn de la vortoj, t.e. ne ekzistas la sustantivoj, la adjektivoj, la verboj... Ĉi tiel se ni, ekzemple, uzas la vorton *moku* la kunteksto de la frazo sciigos al ni ĉu temas pri la verbo "manĝi", pri la sustantivo "manĝaĵo" aŭ pri la adjektivo "manĝebla". Komprenble se oni diras *mi moku*, tio signifas, ke "mi manĝas".

Ankaŭ ne ekzistas la tempoj en la verboj, denove ni scios ĉu oni parolas pri la as-tempo, pri la is-tempo aŭ pri la os-tempo pro la kunteksto de la frazo.

Ankaŭ ne ekzistas la verbo ESTI. Se oni deziras diri ion pri io, ekz. "mi estas bona" ni simple diros "mi bona" *mi pona.*

Neado

Oni metas la nean partikulon *ala* post la koncerna vorto.
Ekzemple:
Mi ne dormas = *mi lape ala.*
Vi ne estas forta = *sina wawa ala*
Neniu parolas = *ja ala li toki*
(memoru, ke inter ĉiuj subjektoj kaj la verbo, escepte se oni uzas la personajn pronomojn *mi* aŭ *sina*, estas necese lokigi la partikulon *li*).

Suno li suli = la suno estas granda.
Suno li suli ala = la suno ne estas granda, aŭ, la suno estas malgranda.

Jes / Ne demandoj.

La lingvo Toki Pona uzas tre simplan modelon por ĉi tiaj demandoj. Oni oferas al la aŭskultanto ambaŭ elektojn, ekz.

Ĉu vi bonfartas?
Sina pona ala pona?

Laŭlitere tio signifas ĉu vi estas malbona aŭ bona?

Ekzemploj:
suno li suli ala suli?
Ĉu la suno estas malgranda aŭ granda?
Suno li suli La suno estas granda.

Verbo *WILE* .

La verbo *WILE* signifas "voli", "deziri".
mi wile moku = mi deziras manĝi.
mi wile moku e teli = mi deziras manĝi frukton
(la rektan objekton –kiu en esperanto aperas kun la finaĵo –n- en Toki Pona ni konas ĉar oni uzas la partikulon *e*)

Ekz.
Mi moku e teli
Mi manĝas frukton

Al la demando:
Sina wile ala wile moku e teli?
Ĉu vi deziras manĝi frukton?
Oni povas respondi:
mi wile moku e teli
(jes, mi deziras manĝi frukton)
mi wile ala moku e teli
(ne, mi ne deziras manĝi frukton).

Kompleksaj frazoj

Temas pri tiuj frazoj kiuj havas ununuran subjekton sed du au pliajn predikatojn, ekz. *mi manĝas kaj trinkas*. La solvo proponita en la lingvo Topikona estas tre simpla : oni aperigas la subjketon poste unu predikaton kaj poste la alian kun la partikulo *li* . Jen la traduko den Toki Ponan de la ekzemplo antaŭe dirita :
mi moku li telo
Se mi deziras diri : *mi volas manĝi kaj trinki,* memoru la uzon de la verbo *wile.*
mi wile moku li telo .

Se temas pri ununura subjekto, ununura verbo kaj du direktaj objektoj la solvo ankaŭ estas tre facila :
Mi vidas la teron kaj la sunon
mi lukin e ma e suno

Kunmentoj de vortoj

Ĉar Toki Pona havas malmultajn vortojn (memoru nur 118 vortoj!), oni uzas por esprimi centojn da ideojn, kunmetajn vortojn, iom similaj al la kunmetaj vortoj de esperanto. Jen kelkaj ekzemploj:

jan pona = amiko.
laŭvorte ĝi signifas bona homo.

ilo moku = manĝilo (kulero, tranĉilo...)
laŭvorte ilo por manĝi.

jan lili = infano
laŭvorte malgranda homo

jan utala = soldato
laŭvorte homo por militi

Pluralo

Oni adicias la vorton *mute* (multa, multe).

Ekzemple:
mi = mi
mi mute = ni
sina = vi (singularo)
sina mute = vi (pluralo)
ona = li, ŝi, ĝi
ona mute = ili

Posedaj Pronomoj

La persona pronomo aperas post la vorto, ekzemple:
mia domo = *tomo mi*
via amiko = *jan pona sine*
miaj domoj = *tomo mute mi*
iliaj amikoj = *jan pona mute ona mute*

Mi vidas vian belan domon
mi lukin e pona tomo sine

Kelkaj utilaj frazoj

Saluton = *toki*
Bonvenon = *kama pona*
Dankon = *pona*
Kiel vi fartas? = *sina pilin seme?*
Ĝis revido = *mi tawa*

Koloroj

Blanka = *walo*
Nigra = *pimeja*
Ruĝa = *loje*
Blua / Verda = *laso*
Flava = *jelo*

Numeraloj

Oni uzas la ciferojn 1, 2,3... Do, ne ekzistas propraj vortoj por ĉiuj numeroj, escepte:

1 = *wan* 2 = *tu*

Ki- Demandoj

Seme korespondas al la esperanta "kio" (nur demande ne relative) aŭ al la elemento "ki-" en kiu? kie? kial? kiam?, ktp. *Seme* sekvas la pridemanditan vorton, aŭ staras sole por indiki ion.

Sine moku seme? Kion vi trinkas?
Jan seme li kama? Kiu venis?
Ona li lon seme? Kie li estas?

La vorto *lon* utilas por indiki spacon, sed tute ne rilatas al la verbo "esti" kiu ne ekzistas en la lingvo Toki Pona.

EKZEMPLOJ

Kiu manĝas fruktojn?
Jan seme li moku e kili mute?

Mi manĝis hieraŭ fruktojn.
Mi moku tenpo suno pini e kili mute

La akvo estas bona
Telo pona

PRAKTIKU VI MEM

Manĝi estas bone

_____

(~~moku pona~~)

Kiu venis hieraŭ?

_____

_____

~~(Jan seme li kama tenpo suno pini?)~~

Mi lukin e jan pona sine

_____

(~~mi vidas vian amikon~~)

Daŭrigante nian kompletan internacilingvan am-deklaran vortaron, sciu, ke se Vi havas amaton aŭ amatinon parolanta Toki Pona lingvon, Vi devos diri al li / ŝi

MI OLIN E SINA

Nuntempa Situacio de la Lingvo TOKI PONA

Kiel jam dirite la lingvo Toki Pona komenciĝis ellabori en la jaro 2001. Temas pri lingvo ekzistanta nur pere de kontaktoj en Interreto de kelkaj personoj (laŭdire ne pli ol 10 personoj parolas bone la lingvon Toki Pona en la tuta mondo). Tutcerte, se la vivo de la lingvo daŭriĝas ĝi estos perfektigita de sia kreantino kaj siaj parolantoj.

Por informi al ĉiuj eblaj interesitoj pri la internaciaj lingvoj ĝis nun pritraktitaj sur la subriko "Interlingvistiko" de ĉi tiu revuo, jen kompleta listo:

VOLAPÜK (n-ro 54)
SOLRESOL (n-ro 55)
NOVIAL (n-ro 56)
OCCIDENTAL (n-ro 57)
LATINO SINE FLEXIONE (n-ro 58)
IDO (n-ro 59)
UNITARIO (n-ro 60)
RO (n-ro 61)
INTERLINGUA (n-ro 62)
NEO (n-ro 63)
GLOSSA (n-ro 64)
LING (n-ro 65)
PICTO (n-ro 66)
VIKTO (n-ro 67)
AUXIL (n-ro 68)
PANROMAN (n-ro 69)
FRATER (n-ro 70)
ROMANOVA (n-ro 71)
FRENDO (n-ro 72)
MONDLANGO (n-ro 73)

Se Vi ŝatas ĉi tiun rubrikon kaj mankas al Vi la paĝoj dediĉitaj al unu aŭ kelkaj el tiuj help-lingvoj, ne hezitu peti ilin al la jena adreso:

Sekcio Interlingvistiko aŭ al esperanto14@supercable.es
Gazeto Andaluzia
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 3142
14080 Córdoba (Hispanio)



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto

je la servo de la disvastigo de la internacia lingvo en Andaluzio.

Aliĝu al AEU !!!

Protokolo de la Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

En la urbo Malago, la 2an oktobro 2004 renkontiĝas en la Malaga Haveno la Ordinara Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Asociación Andaluza de Esperanto en la hispana lingvo, ĉeestas 9 membroj kaj ili, krome, reprezentas aliajn 3 membrojn. Prezidas la asembleon S-ro Andrés Martín González kaj agas kiel sekretario S-ro Angel Arquillos López.

Tagordo

- Konto-stato je la 31a de decembro 2003.

Analizitaj la enspezojn kaj la elspezojn okazintaj dum la jaro 2003 oni aprobas unuanime la jenan konto-staton:

Enspezoj: 1.211´40 eŭroj.
Elspezoj: 659´81 eŭroj.
Favora Saldo: 551´59 eŭroj.

Pasintjara saldo (31an-dec-2002): 6.182´40 eŭroj.
Nova saldo (31an-dec-2003): 6.733´99 eŭroj.

- Instruado de esperanto.

Dum la jaro 2003 la asocio daŭrigis la kursojn perkorespondan kaj per-retan. Oni elstaras, ke la nombro da gelernantoj ne estis granda, do estas necese altiri la atenton de novaj eblaj gelernantoj. Ĉi-sence oni akceptas la proponon enirigi esperanton en la Universitato de Malago proponita de S-ro José Manuel Valdivia. La Asembleo komisias al S-ro Angel Arquillos pri la instruado de esperanto en ne-universitataj centroj kaj al S-ro José Manuel Valdivia pri instruado en universitatoj.

- Esperanto en bibliotekoj.

Oni informas ke, dank´al la prizorgoj de membro de la asocio, kelkaj bibliotekoj ricevis ekzemplerojn de la nova verkaĵo "Gran Diccionario Español-Esperanto" kaj, ke tiu valora libro jam troviĝas je ĉies dispono en tiuj bibliotekoj.

- Publikaĵoj: Monate ĉe Vi; Gazeto Andaluzia kaj Opiniaro.

Oni agnoskas la penojn de tiuj kiuj ebligas la ekziston de la eldonaĵoj de la asocio. Oni aprobas la kutiman enhavon kaj formaton. Oni kuraĝigas al ili daŭrigi ĉi tiun laboron.

- Nia asocio kaj Esperanta Civito.

La Prezidanto de la Asembleo, kiu samtempe estas unu el la delegitoj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉe Esperanta Civito, substrekis la sendependecon de tiuj asocioj kiuj aliĝas al la Pakto por la Esperanta Civito, la akcesorecon de ambau organizaĵoj kaj la valoro de la personoj kiuj regas, disvolvigas kaj antaŭenirigas la Esperantan Civiton. Oni sciigis, ke la rilatoj inter Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj Esperanta Civito bonfartas.

- Delegitoj de Universala Esperanto-Asocio.

Oni informas denove pri la eblecon subvencii al tiuj personoj kiuj deziras esti delegitoj de Universala Esperanto-Asocio en Andaluzio. La helpo konkretiĝus en parto-pago de la membro-kotizo ĉe UEA fare de nia asocio. Oni memorigas, ke por esti delegito de UEA estas necese esti jam membro de tiu asocio almenau dum unu antaŭa jaro.

- Petoj kaj Proponoj.

La Prezidanto informas, ke pere de la S-roj José María Rodríguez kaj José Roldán oni ricevis peton por mon-helpi la organizadon de la proksima 10a Andaluza Kongreso de Esperanto. Post debati la proponon oni akceptas subvencii tiun kongreson pere de 200 (ducent) eŭroj.

La ĉeestantoj akceptis la proponojn:
- okazigi en Malago oftajn renkontiĝojn por praktiki la internacian lingvon.
- Studi la eblecon krei federacion aŭ konfederacion de la andaluzaj esperanto-asocioj.

Kaj sen pliaj pristudindaj aferoj la Prezidanto fermis la Asembleon je la 13'30a horo de la dato sube menciita. Ĉi ĉion mi certigas, vidita kaj aprobita de la Prezidanto.

LA SEKRETARIO

Provizora Programo de la 10a Andaluza Kongreso de Esperanto

Organizas: Sevilja Esperanto-Asocio
Kunlaboras: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Sevilja Urbodomo. Fako pri Civitana Partoprenado.
Kongresejo: Centro Cívico de la Casa de las Sirenas
Alameda de Hercules s/n (Seviljo)

31an de oktobro (dimanĉo).

- (11a horo) Akceptado de partoprenandoj kaj disdonado de materialo.
- Malfemo de la Kongreso kaj sinprezento de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj de la lokaj esperantistaj asocioj de Malago, Kordovo, Jaeno, Onubo kaj Seviljo.
- Prelego "Esperanto hodiaŭ" far Antonio Rodríguez Gasch.
- Prelego "El Esperanto en Internet" far Manuel Ortega Castillo.
- Prezentado de la libro "Gran Diccionario Español-Esperanto" kiun oni disdonos al la Publika Biblioteko de Seviljo.
- Prezentado de ekspozicio de libroj en kaj pri Esperanto.
- (16´30a horo) Prelego "Reacciones Negativas y Temores al Esperanto" far Victor Manuel Macías Caro.
- Prelego "Ĉu eblas instrui Esperanton en la Universitato?" far José María Rodríguez Hernández.
- Debato inter la partoprenantoj al la Kongreso pri kiamaniere antaŭenirigi Esperanton en Andaluzio.
- Projekciado de filmoj (ĉefe pri Naturo) en Essperanto.
- Elementaj kaj mezaj ekzamenoj.

1an de novembro (lundo).

- (10´30a horo) Prelego "Esperanto, Andalucismo y Blas Infante" far Juan de Dios Montoto de Sarriá.
- Fermo de la Kongreso, legado de la konkludoj kaj disdonado de diplomoj.
- Turisma vizito al la Reĝaj Alkazaroj de Seviljo.

Esperanto en Jaeno

Alfonso Escamilla Roa



En la jaro 1995 mortis nia jaena samideano Francisco Uceda Flores. La ĵurnalo JAEN aperigis ĉi tiun afablan karikaturon pri li.

Estis malfacile kredi kaj eĉ pensi, ke nenio restis el tiu grupo de esperantistoj loĝantaj en la urbo Jaeno dum la tria jardeko de la ĵus pasinta 20a jarcento. Ili estis elstaraj personoj, kiel Eduardo Arroyo Sevilla, la industriistoj Juan kaj Manuel Anguita Galán, posedantoj de la firmao "Papelería Anguita", la konata fotografiisto Manuel Alcázar Criado kaj nia grupo de junaj studentoj en la Porinstrua Lernejo kiuj hazarde renkontiĝis. Okazis, ke en la Porinstrua Lernejo de la strato Almendros Aguilar en Jaeno, la lernanto Francisco Uceda Flores venis kun malgranda broŝuro kies titolo estis "Ŝlosilo de la Lingvo Esperanto". Esperanto, laŭ tiu libreto, estis lingvo ege facila, kreita de la pola Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof antaŭ 43 jaroj kun la deziro utili kiel internacia lingvo, pere de kiu oni povus eviti multajn militojn favorigante la pacon en la tuta mondo.

Francisco Uceda Flores prezentis al ni la lingvon kiel mirindaĵon por la Homaro, kaj li kuraĝigis al ni studi la lingvon kaj atingi, tiumaniere, grandan profiton, simile al elspezo de malgranda monkvanto por atingi grandan premion en la lotado. La grupo kiu akceptis lerni Esperanton konsistis el la fratoj Uceda Flores (Paco, Antonio kaj Manuel), José López Ros, studento pri teknik-inĝenierio kaj la jena subskribanto Alfonso Escamilla Roa.

Estis malfacile kredi kaj eĉ pensi, tion mi jam diris, ke neniu el tiu grupo, fervoraj defendantoj de Esperanto kiel instrumento kapabla atingi la deziratan bonfarton por la nacioj de nia mondo, restis eĉ la plej malgrandan ŝpuron de tiu agado sed ja almenaŭ la eston de tiu spirito.

Jesja, al tiuj gloraj esperantistoj, pioniroj en Jaeno, mi devas adicii tiujn kiuj nuntempe troviĝas sur la malfacila tasko atingi la antaŭeniradon de la homoj laboremaj kaj studiemaj. Ili estas pretaj triumfi en sia laboro. Sur la numero 73a de *Gazeto Andaluzia* aperas surpriza informo por mi, en Jaeno du samideanoj Pablo A. Foche Pérez kaj

Francisco Díaz de la Torre, kreis oficiale la Jaenan Esperanto-Asocion. Mi deziras al ĉi tiu nova asocio sukcesojn por havigi al la jaena popolo sian laboron sen ripozigi nek sian entuziasmon nek sian fidon kiu ja alproksimigas montojn.

Por fini, permesu al mi, adicii la jenajn opiniojn kaj kriteriojn de du internaciaj organizaĵojn kaj de hispana verkistino pri Esperanto.

Franca Akademio pri Sciencoj :
Esperanto estas logika kaj facila majstra faro.

Usona Filozofia Societo :
Ĝi estas la plej simpla kaj racia solvo al la lingva problemo.

Concepción Arenal, hispana verkistino :
La universala lingvo sukcesos. Kiam ? Ĉu antaŭ ĉu poste, tio dependos de la bona aŭ malbona volo de la homoj, kiu ĉi-kaze kiel en ĉiuj aliaj okazoj, nur povas malfruigi ĝin por ilia honto aŭ rapidigi ĝin por ilia gloro.

Kaj kiel finaĵo mi deziras aperigi hispanlingvan soneton kiun, okaze de publikigo de libro, mi dediĉis al Esperanto. Mi direktas ĝin ĉefe al niaj politikistoj.

La Humanidad, con "jobiana paciencia",
se siente forzada a aprender inglés ;
no el español, el ruso o el francés ;
"está siendo humillada por prepotencia ".

No llegará la "paz" por esta exigencia,
pues, cada cual su idioma desea imponer
como medio de expresión y de placer,
amén de su exclusiva conveniencia.

Si existe un idioma internacional
que cultas personas y Sociedades
observan, flexible y de bello encanto,
aceptado com solución cabal
żPor qué no aprovechar las cualidades
que a la Humanidad dona ESPERANT O ?

estrambote

Son las politicastras ambiciones
las que todo lo arreglan y corrigen ;
pero, si a perder el puesto que rigen
los conducen algunas "pretensiones",
aún siendo necesarias, no se exigen.

Linares, aŭgusto 2004

ANDALUZA LITERATURO

(tradukita en esperanton)

MORALAJ EPISTOLOJ AL LUKILJO

de Lukjo Anneo SENEKO
trad. J.M.R.H.

Epistolo 83-a (1-7)

Vi petas al mi rakonti detale pri miaj tagoj. Mi plenumos vian peton kaj tutplezure mi skribos al vi kronologie pri tio kion mi faras. La hodiaŭa tago estas kompleta peco, neniu demetis ion el ĝi kaj mi plenokupis ĝin inter la lito kaj la legado.



Mi dediĉis malmulte da tempo al la fizika ekzercado, kaj pro tio mi estas dankema al mia maljunaĝo, tio estas facila, tuj kiam mi moviĝas mi lacas: jen la fino de ĉiu fizika ekzercado eĉ por la plej fortaj uloj. Ĉu vi demandas pri miaj kunuloj en la gimnastikejo? Sufiĉas nur unu, Farjo, kiel vi jam scias li estas knabo afabla, kvankam mi baldaŭ elektos alian, mi jam preferas alian malpli fortan. Kurioze, li diras, ke ni suferas la saman problemon, ambaŭ ekperdas niajn dentojn. Sed mi jam preskaŭ ne povas sekvi lin kiam ni kuras kaj post kelkaj tagoj mi eĉ ne povos atingi lin: vidu la profiton de la ĉiutaga ekzercado. Rapide kreskiĝas la distanco de du personoj kurantaj laŭ kontraŭa senco: samtempe li supreniras kaj mi malsupeniras kaj vi ne povas imagi kiom pli rapide okazas ĉi tio ol tio. Mi mensogis: nia aĝo ne malsupreniras, simpe ĝi defalas.

Ĉu vi deziras koni kiel finiĝis nian ĉi-tagan konkuron? Jen io kio malofte okazas al kurantoj: ni remisis.

Post ĉi tiu peno, pli ol ekzercado, mi submerĝis en malvarma akvo: ĉe mi tio signifas akvon iom varmigita. Tiu amanto de la malvarmaj banoj, kiu la unuan de januaro salutis la kanalon, kiu en la nova jaro komencis, krom legi, skribi aŭ ion diri, salti en la fontanon de la Virgulino kaj poste en tiun banejon kiu, kiam mi plifortiĝas kaj ĉio marŝas bone, la suno varmigas: jen normala banado.

Poste seka pano kaj manĝado for de la tablo, tiel ne estas necese purigi miajn manojn. Mi dormas malmulte. Vi jam konas mian kutimon: mi bezonas kurtegan dormadon, kvazaŭ sieston; sufiĉas al mi ne esti vekita dum momento: kelkfoje mi ne scias, ke mi dormis, alifoje mi tion suspektas.

Jen la frakasa aklamado de la cirko; miajn orelojn ĝenas ĝenerala kaj subita ekkrio, sed tio ne apartigas min el mia meditado, eĉ ĝi ne estas interrompita. Mi eltenas kun granda pacienco tiun bruegon: multaj voĉoj miksiĝitaj en ununura estas por mi kiel ondo aŭ vento skuanta la arbaron kaj la ceterajn sensencajn sonojn.

Ĉeestu la 10an Andaluzan Kongreson de Esperanto.

La plej proksima renkontiĝo de la esperantistaro. Se Vi deziras praktiki, aŭskulti, konversacii aŭ ekzameniĝi en esperanto jen Via ŝanco.

Por ĉeesti kontaktu kun unu el la jenaj adresoj:

noelnadlor@hotmail.com
manuelortega87@hotmail.com
esperanto14@supercable.es

aŭ en la telefono 661 40 41 20 (Manuel Ortega)

NI ATENDAS VIN

MISTEROJ KAJ LEGENDOJ DE ANDALUZIO

j.m.r.h.



Unu el la vizaĝoj aperintaj ĉe María Gómez en Belmez de la Moraleda (Jaeno) en la jaro 1971

Novaj Vizaĝoj aperas en Belmez de la Moraleda (Jaeno)

Ni sciigis en alia numero pri la forpaso de María Gómez Cámara, la dom-mastrino de la vilaĝo Belmez de la Moraleda en Jaeno, kie antaŭ 33 jaroj aperis strangaj parapsikologiaj fenomenoj konataj tutmonde kiel "la vizaĝoj de Belmez". Temis pri la apero de vizaĝoj sur la planko de la kuirejo de María Gómez, ĉiuj specialistoj pri ĉi tiuj temoj asertis, ke la fenomeno daŭriĝus dum María Gómez loĝus en tiu domo.

María mortis antaŭ kelkaj monatoj, sed ne pro tio la vizaĝoj malaperis. Kaj en la monato oktobro 2004 aperis nova ne-kredebla informo: novaj vizaĝoj aperis, sed ĉi-foje ne en la domo de María Gómez, sed ĉe la domo kie ŝi naskiĝis, ambaŭ en tiu sama vilaĝo. La nevino de María Gómez petis al la specialistoj de la Hispana Societo pri Parapsikologiaj Esploroj viziti la domon kie naskiĝis María, tiutempe neniu loĝis tie, tamen oni aŭskultis strangajn bruojn.

La pasintan 25an de septembro, kiam la specialistoj preparis siajn sonbendigilojn por kapti tiujn strangajn bruojn, ili eltrovis sur angulo de la planko de tiu domo similan fenomenon al tiuj de la vizaĝoj jam aperintaj en la alia domo. Ili komencis esplori la tutan konstruaĵon kaj finfine ili trovis 21 novajn vizaĝojn, sed kiel dirite ĉi-foje ili ne troviĝas en la domo kie loĝis María sed ja tie kie ŝi naskiĝis. La esploristoj de la Hispana Societo pri Parapsikologiaj Esploroj promesis redakti informon pri ĉi tiu nova eltrovo, kaj kompreneble ni sciigos pri ĝi ene de ĉi tiu paĝo.

La mistero de la vizaĝoj de Belmez komenciĝis la 23an de aŭgusto 1971, tiam María trovis sur la planko de la kuirejo de la domo kie ŝi loĝis strangajn makulojn kiuj similis al vizaĝoj. La edzo kaj la filo de María decidis fosi sur la plankon de la kuirejo kaj poste rekonstrui ĝin, sed la vizaĝoj denove aperis. La municipaj aŭtoritatuloj de la malgranda jaena vilaĝo decidis fosi trimetran truon, oni trovis homajn ostojn, ĉar laŭdire tie troviĝis antikva tombejo, tamen oni trovis neniun fidindan kialon rilate la vizaĝojn. Finfine la esploristoj asertis, ke María Gómez posedis la strangan menso-povon bildigi sur la plankon tion kion ŝi pensis aŭ imagis.

revenis hejmen, ĝi ekziliiĝis kun la leteroj de la ekziliita.

Ĉu eblas organizi la 10an Andaluzan Kongreson de Esperanto?

Grupo da sevilaj samideanoj laboras en la organizado de la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto laŭ la jenaj proponoj:

- La Kongreso okazus en la urbo Sevilo la dimanĉon 31an de oktobro kaj la lundon 1an de novembro. Ĉi tiel, oni profitus longan semajnfinon kiu finiĝas la lundo 1-a de novembro (festo-tago en Andaluzio).

- La organizantoj de la Kongreso ne pripensas grandajn aktojn, male, oni organizus nur eblan prelegon ĉe publika biblioteko de Sevilo pri Esperanto, samtempe al la oficiala donaco de la "Granda Vortaro Hispana-Esperanto" al tiu biblioteko. Dum la Kongreso oni organizus unu aŭ du prelegojn en esperanto pri malsimilaj temoj, inter ili jam proponita "*Eblecoj instrui esperanton en la hispanaj universitatoj*".

- Se ni havas favoran respondon de la Parlamento de Andaluzio, la kongresanoj povus viziti ĝin. Oni profitus por donaci al la Parlamento de Andaluzio esperant-lingvan version de la Aŭtonom-Statuto de Andaluzio.

- Dum la kongreso funkcius libro-servo kie oni povus aĉeti librojn kaj materialon en esperanto.

- Dum la kongreso povus okazi la ĉi-jara eksterordinara ĝenerala asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ĉi-tiel oni atingus pli grandan ĉeeston al tiu asembleo kaj do, plian partoprenadon en la komunaj decidoj de nia asocio.

- Se eble, fina komuna manĝo-festo povus okazi por fermi la kongreson.

Se Vi trovas ĉi proponojn interesaj ne hezitu kontakti kun unu el la jenaj adresoj: esperanto_sevilo@yahoo.es ; esperanto14@supercable.es ; noelnadlor@hotmail.com ; ni atendas viajn proponojn, sugestojn kaj se vi povas veni en Sevilon ne rezignu vian partoprenon en la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto.


FLAMENKO

PACO DE LUCÍA

La flamenka arto devas gratuli sin, ĉar unu el la ĉefaj reprezentantoj de la flamenkaj gitaristoj, la alhecira Paco de Lucía, ĵus atingis la Astur-princan Premio de la Artoj. La aŭtoro de gitar-kompozicioj tiel ne-kredeble belaj kiel *Inter du akvoj*, estas unu el la plej grandaj majstroj de la nuntempa flamenko, kaj sendube li estas la gitaristoj kiu atingis ŝanĝi la rolon de ĉi tiu instrumento en la flamenko. Ĝis Paco de Lucía la gitaro nur utilis por akompani la kantistojn, post li, la gitaro povas esi ankaŭ perfekta esprimilo de la flamenkaj sentoj.

Li nomiĝas Francisco Sánchez Gómez, kvankam ĉiuj konas lin kiel Paco de Lucía. Li atingis revolucii la idiomon de la gitaro ene de la Flamenko kaj ankaŭ en aliaj muzikaj stiloj, ĉar li sukcesis kombini la flamenkan gitaron kun la ĵazo, la brazila muziko, la salso kaj eĉ kun la klasika muziko. La kontaktoj inter la flamenko kaj ĉi tiuj muzik-stiloj pere de la gitaro de Paco de Lucía, evidentigis la ŝanĝojn en la nuntempa flamenko.

Gratulon Paco, ĉar vi atingis enirigi novajn agordojn kaj ritmojn en la flamenko pere de via gitaro.



Paco de Lucía
nova Astur-princa premiito

"La Lingvo de la arto estas kiel esperanto por la artistoj ni povas interkompreniĝi per la ideoj"

La pasintan monaton julio prezentiĝis en Kordovo la flamenka komedio "Rinconete y Cortadillo", kadre de la gitara festivalo okazinta en Kordovo ĉiujare. Ĉi tiu komedio celas demeti al la flamenko sian tragikan flankon kaj prezenti eĉ humorajn okazintaĵojn kie la flamenko ĉefrolas. La aŭtoro de la spektaklo estas Javier Latorre kaj li, okaze de intervjuo publikigita ĉe loka ĵurnalo en Kordovo respondis:

Kiam oni parolas pri kunfandiĝo pli indas paroli pri komuneco inter artistoj. Mi pensas, ke la idiomo de la arto estas kiel esperanto kiu utilas reale por tiuj kiuj estas artistoj, ne estas necese paroli la saman lingvon, ni povas interkompreniĝi per la ideoj".

POEZIA ANGULO

Iak (Don Mail de NULA horo)


Korstartilo 04-02-30, & indigne & ĝisĉiame, certe resolute

Ne interŝanĝu literojn ene de vorto:
Kuplo ne egalas al kulpo,
nenia-ale, nenia-isme, nenia-ike.
Ĉio ĉe li estas nova
& survojas li denove per motorciklo,
emis li esti nova homo
laŭ la koro de siaj imagoj.
Sed mi (!) restas proksime,
multe povas esti mortiga:
la klimato, la kuracisto,
la paralizo mem,
multaj tro malfruas
& poste ofte nur restas majstreco
pri kalkulita rompo de tabuoj.
En la kredopotencia amlagamo
estiĝis interbatiĝo & la aŭtisto perdiĝis,
Ĉiam malbone venas la signalo el Romo
& iuj ondoj multe suferas
pro la anglalingva elsendo
de Radio Nul.
La Latinamerikanoj same malrapide
parolas kiel la ĉinoj & pro tio
bone taŭgas por (piaj) komencantoj.
Kontrolu la situacion de via akordiga butono
antaŭ ol vi akuzas la stacionojn!
& ne estu tioma DIN-kapriculo!
Tutmondaj kabloj, senpera faderno.
Maro & mono –kiom grandiozaj esperoj!
Kunpreni ĉion, kio povus servi al vi
dum la senelektrika libera tempo.
Nur la kompleta pli-malpli veras,
havas pli-malpli longan hararon
& ekzakte la korbetgrandon 90D
sube de la kolvertebroj,
kiuj fiksas la penspovon al resto.
Faktoj faras, manoj, mono.
Korporacia guvernado & klimatofuĝintoj-
kion alian nun
por ĉiam.
La korstartiloj –jam pro ĉirkaŭ 100 ojroj
& kompreneble ĉe Karefuro & Sprintero...

TURISMI EN .... ALCALA LA REAL (JAENO)


Duonvoje inter Granado kaj Kordovo, sed en la provinco Jaeno, troviĝas Alcala la Real, verŝajne pro tiu egaldistanco ĝi estis gravega loko por ĉi tiuj tri antikvaj regnoj. Laŭdire Alcalá estis fondita de la turduloj en la dua 2a jarcento a.K. Ekzistas romiaj enskriboj gravuritaj sur ŝtonoj kie aperas la nomoj *Ipocobulcola* kaj *Iliturgicola*, sendube unu el tiuj nomoj, aŭ ambaŭ, estis la origina nomo de Alcalá.

Sed vere Alcalá la Real naskiĝas kiel vilaĝo kun la araba konkero. La originon de la vilaĝo ni trovas en la zono defendita de la turoj kaj muregoj de la kastelo La Mota, fortreso apartenanta al la granada araba regno. Dum la jarcentoj 11a, 12a kaj 13a Alcalá la Real kaj la fortreso La Mota apartenis alterne al la kristanaj kastelianoj kaj al la arbaj reĝoj, ĉefe tiuj de Granado.



Blazono de Alcalá la Real (Jaeno)

La 12a jarcento estas la glora epoko de la kulturo en Alcalá la Real, dank'al la familio Ben Said kiu protektis verkistojn kaj historiistojn, ekde la tempoj de Abd al-Malik ben Said ĝis lia pranepo Ali ben Muza ben Said al-Magribi oni verkis kompletan libraron enhavanta historiajn, geografiajn kaj literaturajn konojn. La libraro finfine aperis en Kairo en la jaro 1248. En la jaro 1341 la urbon konkeris definitive la kastilia reĝo Alfonso la 11a kiu aldonis al la araba nomo "Alcalá" la kromnomo "la Real" (*la reĝa*).



La abata preĝejo kaj la turo videblas el longdistancaj ĉirkaŭaĵoj de Alcalá la Real


La urbo kaj la fortreso estis grava loko por la fina konkero de la granada araba regno. El ĉi tie eliris la katolikaj reĝoj por kapitulaciigi definitive Granadon.

Komence de la 19a jarcento en la vilaĝo loĝis malmultaj personoj kaj post sia retreto la napoleon-armeo bruligis la fortreson. Hodiaŭ Alcalá la Real estas belega vilaĝo kie loĝas 21.000 personoj kiuj okupiĝas ĉefe je

la agrikulturo, ĉefe al la produktado de altkvalita oliv-oleo.

s **Ĉefaj Vidindaĵoj.**

La Fortreso aŭ Kastelo La Mota.
Ĝi stariĝas sur kruta monteto. Ĉirkaŭ ĉi tiu kastelo naskiĝis Alcalá la Real. Eĉ la propra nomo de la vilaĝo "Alcalá" signifas tion en la araba lingvo "la fortreso". Ekzistas ankoraŭ restaĵoj de la murego. Post la kristana konkero de la urbo la reĝo deziris interligi tiun fortreson kun la reĝa krono kaj pro tio li fondis reĝan abatejon kiuj sidejis en la kastelo ĝis la komenco de la 19a jarcento. Hodiaŭ ĝi estas vizitebla, kaj vizitinda, monumento.



Sur la vilaĝo Alcalá la Real troviĝas la fortreso La Mota

Preĝejo la Consolación aŭ Santa María la Mayor.
Oni konstruis ĉi tiun belan preĝejon dum la 16a jarcento sed sur ĉi tiu zono mem oni trovis romiajn restaĵojn. Ĉi bela preĝejo troviĝas en la centra parto de la urbo kaj ĝi posedas belegan fasadon.

Abata Preĝejo.
Ĝia alta turo (42 metroj) videblas el granda distanco. Ĝi troviĝas en la antikva fortreso La Mota kaj ĝi estas la preĝejo de la reĝa abatejo fondita de la reĝo Alfonso la 11a. La enirpordo prezentas latinan enskribaĵon kie oni povas legi *Ĉi tio estas nur la Dia hejmo kaj la Ĉiel-pordo.* Post la napoleon-armea retreto la preĝejo suferis bruligon. Dum la lastaj jaroj oni intencas rekonstrui ĉi tiun belan monumenton.

Festoj.
La Candelaria.
La 2an de februaro oni bruligas la olivuj-branĉojn tranĉitaj post la oliv-rikoltado. Ĉirkaŭ la ĝoj-fajroj la alcala-anoj trinkas vinon kaj oferas dolĉaĵojn al ĉiuj vizitantoj.

Tipaj Manĝaĵoj.
Unu el la plej tipaj manĝaĵoj portas kuriozan nomon "La Secretaria" (la sekretariino). Temas pri tipa riza manĝaĵo sed... sen rizo. Tio estas: tomato, cepo, viando kaj oleo, ĉio necesa por prepari bongustan rizon, sed finfine oni ne adicias la rizon.

La reĝa monakinejo de la Encarnación preparas bongustajn dolĉaĵojn kiuj havas allogajn nomojn kiel *bolillos, higos* kaj *cuajaos*

Venont-numere
TURISMI EN....
Lora del Río (Sevilo)

FAKAJ ASOCIOJ

Temas pri tiuj organizoj kiuj renkontigas siajn membrojn laŭ diversaj profesioj, mondkonceptoj, ŝatokupoj, ktp. Ni prezentas sube kelkajn el la plej gravaj kune kun la adreskontakoj, eble al Vi interesas kontakti kun iu el ili.

Agrikulturo. Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio.
Hunag Yinbao, Jingchua-Xian, Kewei, Gansu, CN-744300 Ĉinio
chjc0003@public.lz.gs.cn Organo: *Internacia Agrikulturo*

Alternativa Ekonomio. SIKA-Esperanto
René Ballaguy, 12 rue du Cdt. Cousteau, FR-9500 Boisemont, Francio.
esperanto.l95@wanadoo.fr

Arto. Universala Artista Ligo de Esperantistoj.
Maria P. Almada. Av. Bernardino de Campos 624/72 BR-11065-002 Santos-SP Brazilo marija@uol.com.br

Astronomio. Astronomia Esperanto-Klubo
astroek@yahoo.com www.esperanto.org/AEK

Ateismo. Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo
Claude Nourmont 2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio
moonmont@pt.lu Organo: *Ateismo*

Bahaismo. Bahaa Esperanto-Ligo
Eppsteiner Str. 89 DDE-65719 Hofheim-L´haim Germanio
bahaaeligo@bahai.de Organo: *La BEL-Monda Letero*

Biciklado. Biciklista Esperantista Movado Internacia
Ivo Miesen, Bloemenweg 102 NL-6221 TX Maastricht Nederlando
ivo_m@dds.nl Organo: *BEMI-revuo*

Biologio. Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturo
Hertendreef 12 BE-2920 Kalmthout Belgio

Blinduloj. Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj
Theodor Speckmann, Trierer Str. 45 DE-50674 Köln (Germanio)
theo.speckmann@t-online.de Organo: *Esperanta Ligilo* (brajla)

Budhismo. Budhana Ligo Esperantista
Yamaguti Sin'iti, Tutihara 3-205 Tenpaku-ku Nagoya-si Aiti-ken
468-0026 Japanio syam-z@wa2.so.ne.jp
esperanto.us/budhana.html

Ekologio. Asocio de Verduloj Esperantistaj
Manfred Westermayer, Kandelstr. 62 DE-79194 Gundelfingen
(Germanio) m.westermayer@comlink.org
www.conlink,apc.org/ave/welcome.htm Organo: *Aveno*

Ekonomio. Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo
Roland Rotsaert, Visspaastr. 97 BE-8000 Brugge Belgio
roland.rotsaert@pandora.be www.ikef.org Organo: *La Merkato*

Ekumenismo. Tutmonda Ekumena Ligo
Odos Rodu 5, GR-11252 Athina Grekio Organo: *Ekumenismo*

Etnismo. Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj
6-12 rue du Fort Wallis, LU-2714 Luxembourg Luksemburgio
etnistoj@bigfoot.com Organo: *Etnismo*

Eŭropa Agado. Eŭropa Klubo
Postfach 2742 DE-58027 Hagen Germanio
siegfried@piotrowski.de Organo: *Eŭropa Dokumentaro*

Evangeliismo. Kristana Esperantista Ligo Internacia
Koningsmantel 4 NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn Nederlando
j.a.van.dijk@hetnet.nl www.chee.com/keli Organo: *Dia Regno*

Fervojistoj. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Jea Ripoche, 6 rue des Platanes, La Gautrie FR-72230 Arnage Francio
jeanripoche@wanadoo.fr Organo: *Internacia Fervojisto*

Filatelo. Esperanto-Ligo Filatelista
H. Heiss, Lohstr. 48 De-77704 Oberkirch Germanio
Organo: *La Verda Lupeo*

Filozofio. Filozofia Asocio Tutmonda
Rua Huberto Rohden 274 Campeche, BR-88064-063 Florianópolis
Brazilo simpozio@simpozio.cjb.netq www.simpozio.cjb.net
Organo: *Simpozio*

Freinet-Pedagogio. Internacia Celado por Edukado Moderna per Esperanto. Henri Ménard, 1 rue Galissonniere FR-44330 Le Pallet Francio. www.freinet.org/espericem Organo: *ICEM-Esperanto*

Goo. Esperantista Go-Ligo Internacia
Nobuo Sakurai, PO Box 5197 Tôkyo Japanio
Organo: *Esperanton pero Goo, Goo per Esperanto*

Handikapitoj. Asocio de Esperantistoj Handikapuloj
Na Okrouhliku 953/21 CZ-530 03 Pardubice Ĉekio
aeh-ikeh@volny.cz www.volny.cz/aeh-ikeh Organo: *Informilo de EH*

Humanismo. Ligo "Humanitas"
Ostarijska 8, HR-10000 Zagreb Kroatio ligohumanitas@yahoo.com
www.geocities.com/ligohumanistas Organo: *Humanitas*

Instruado. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Riouwstraat 172 NL-2585 HW Den Haag Nederlando
iei001@tiscali.nl Organo: *Internacia Pedagogia Revuo*

Interreto. Esperanto@Interreto
echei@ikso.net www.ikso.net/echei

Islamo. Universala Islama Esperanto-Asocio
Lower Mall, 47150 Murree Pakistano

Juro. Esperanta Jura Asocio
T-2031 LU-2925 Luxembourg Luksemburgio
www.geocities.com/ejaaeu Organo: *Jura Tribuno Internacia*

Katolikismo. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
Via de Porta Fabbrica 15 IT-00165 Roma RM Italio
ikue@ikue.org www.ikue.org Organo: *Espero Katolika*

Komunismo. Internacia Komunista Esperantista Kolektivo
16 Aylesbury Street, Neasden, London NW10OAS Britio
keablestan@aol.com www.ikek.org Organo: *Internaciisto*

Konstruistoj. Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
RN 26, route de la Schlucht, FR-68140 Stosswihr Francio
take.ladomo@wanadoo.fr www.take-esperanto.org Organo: *La Domo*

Daŭorigota venontnumere....

Ne forgesu aboni Vian kotizon por la kuranta jaro 2004 (kaj tiun de la jaro 2003 se Vi tion ankoraŭ ne faris). La aliĝ-kotizo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kostas 15 eŭrojn. Uzu unu el la jenaj banko-kontoj:

- BBVA: 0182 4106 71 0207160717
- Caja General de Ahorros de Granada: 2031 0225 54 0100187657

Bv. post pagi Vian jaran kotizon ne forgesi sciigi al la asocio pri Via pago. Uzu por tiu informo nian adreson en Malago, en Kordovo aŭ nian elektronikan adreson.

La venonta numero 75a de la revuo GAZETO ANDALUZIA aperos okaze de la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto, okazonta en Sevilo la venontan 31an de oktobro.

Viajn kontribuaĵojn, opiniojn, sugestojn, kritikojn, kion ajn. bv. sendi al nia adreso:

GAZETO ANDALUZIA, Apartado de Correos 3142, 14080 Córdoba

Vizitu en Interreto la jenajn paĝojn:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo: www.andalucia-esperanto.tk

Kordova Esperanto-Asocio: es.geocities.com/esperantocordoba

Jaena Esperanto-Asocio: www.esperanto-jaen.tk

Sevilja Esperanto-Asocio: www.sevilo.tk

Onuba Esperanto-Asocio: http://groups.msn.com/EsperantoenOnubo

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro
Prezidanto : Andrés Martín González
Vic-Prezidanto: José Francisco Martín del Pozo
Sekretario: Jesús García Martínez
Kasisto: Julio Herrero Segura
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández
Delegito pri rilatoj kun Blinduloj: Alejandro Iglesias Campos.

Adreso: C/ Armengual de la Mota 33, 4D E-29007 MÁLAGA
E-Adresoj: andresper@teleline.es
esperanto14@supercable.es

TTT-paĝo: www.andalucia-esperanto.tk

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

V

Vandalo

Ano de ĝermana gento, kiu prirrabadis Gallujon, Hispanujon, Nord-Afrikon kaj Romon.

Plena Ilustrita Vortaro paĝo 1167a.

En la jaro 411 p. K. diversaj ĝermanaj gentoj eniris en Hispanion akorde al pakto kun la Romia Imperio. Unu el tiuj popoloj, la vandaloj, sidejis sude, en la romia provinco *Betica*.

La origino de la vorto "Andaluzio" (*Andalucía* en la hispana) ankoraŭ ne estas amase akceptita. Laŭ kelkaj historiistoj la vorto devenas de ĉi tiu ĝermana gento, la vandaloj, kiuj restis dum kelkaj jaroj en nia lando. Laŭdire oni nomis la teritorion *Vandalicia* aŭ *Vandalucia* ĉar ĉi tiu estis la zono kie loĝis la vandaloj. Kvankam tre baldaŭ ili trapasis la Gibraltaran Markolon survoje en la nordon de Afriko.

ESPERANT-LINGVAJ VORTOJ KIUJ, HISTORIE AŬ ETIMOLOGIE, DEVENAS DE ANDALUZIO